Österreichische Nationalbibliothek
Zeitschriftensaal

AŬSTRIA

ESPERANTO-REVUO

Oficiala organo de la austria Esperanto-movado
Offizielles Organ der österreichischen Esperanto-Bewegung

Aperas monate

Redakcio kaj administracio: Vieno I., Neutorgasse 9, Aŭstrio. — Telefono U 23-1-80

5-a jaro MARTO/APRLIO 1950 n-ro 3-4

LA VERDAN STANDARDON TRE ALTE NI TENOS !

Pentekoste okazos nia Aŭstria Esperanto-Kongreso en Vieno. La laboro de la LKK sub la iniciatema gvidado de s-ano majoro Sinner progresas kaj resultigis jam bonkompilitan programon. Akceptos nin la salonoj de Dreher-Park ĉe Schönbrunn, kiu per sia parkego donos belan, printempan fonon por la ĉi-jara kongreso de nia mem printempanta landa Esperanto-movado.

Jes, ni kongresas en printempo, la kvaran fojon post la milito, post tiu dezerta, neflorinta, nefruktinta, kvazaŭ "vintra periodo" de nia movado. Sed nun nia afero denove printempas, ekfloras kaj - felice jam prave esperigas pri fruktiga aŭtuno. Ankoraŭ ni nur staras en la plej frua komenco de l'printempo. Kvankam jam la unuaj sunradioj varmetigas la aeron, germigante la esperojn pri baldaŭa florado kaj posta fruktado, tamen ankoraŭ tiam kaj tiam ĉi nin sancelas la akraj ventoj de l' malfavoraj politikaj cirkonstancoj. Ankoraŭ la "postlasaĵoj" de la "vintra" periodo ne malaperis. Ankoraŭ cirkaŭblovas nin sintrude kaj necedeme la "ventoj" el okcidento kaj oriento. Ni estis salutintaj ilin, kiam ili liberigis nin de la "vintro" kaj kiam poste ili helpis sekigi la postrestintan "marĉon" ... sed nun ili cedu kaj lasu la lokon al la varmiganta, fortiganta hejma suno!

Meze inter la politikaj ismoj, al kiuj Esperanto klopodas adapti sin por esti akceptata, nia afero en si mem reprezentas ismon propran. Ĝi ekzistis en la pensoj de Zamenhof antaŭ kiam ekzistis la lingvo mem, kiun li kreis p r o sia ideo. Estas homoj, kiuj ne fidas ĝin,

tiun ĉi "Internan Ideon" de Esperanto, nomante ĝin "nebula revo". Tamen ĝi ekzistas. La moderna esprimmaniero eventuale dirus alie, prefere atribuus al la internacia lingvo "k u l t u r a n t a s k o n" -- kaj tio ja sufiĉus al ni kaj pravigus nin. Esperanto, iam akceptite de n u r kelkaj statoj kiel oficiala, dua lingvo en la lernejo, eksangos radikale la pensajn rilatojn inter la diverslingva homaro. Malaperos la antaŭjugo, nun ankoraŭ kiel nebula vualo baranta al la homaro la klarvidon, kaj eklumos la konsciigo, ke la diverslingveco estas nur fenomeno de (tiam felice pasinta) evoluperiodo de la homaro. Estas antaŭvideble, ke la apero de la internacia lingvo kiel akcesora lernatajo de la lingvo nacia idee influegos la mondkonceptojn.

Jen tial ni Esperantistoj efektive havas mision. Kaj tiun mision ankaŭ la "lingvopraktikulo", ridetinta pri la "revula Esperantismano", ne bezonas nei, ĉar ĝi absolute rezultas el konsideroj pure praktikaj pri la lingvouzo kaj ties nepra ideologia sekvo. Al ĉio kio jam nun pliproksimigas la homojn alilingvajn, al la trafiko, literaturo, radio ktp), la internacia lingvo estas kompletiga postulato. Ni aktivistoj de Esperanto en la nuna, ankoraŭ ne pliprogresinta evoluperiodo sur la vojo al la oficialigo, konscias pri la graveco de nia agado. Ni scias ankaŭ, ke nia laboro ne ĉiam estas plezuriga, kiel ĉiu tasko, kiun oni donis al si kiel devon ----. Skuos nin ankoraŭ la ventoj, sed helan sunon, kiun aliaj ankoraŭ ne antaŭsupozas, ni, pli klarvidaj kaj idealismaj, ni idee, en niaj koro kaj animo, vidas, sentas kaj konservas ĝin.

Starante kiel gracila, sed jam radike fiksita arbeto en la stormaprintempo, nia movado jam ne plu estas elŝirebla el la grundo, kiu tenas ĝin. Periodajn dangerajn kaj stagnajn ĝi jam transvivis, hardate kaj firmigate. Fenomenoj nekontentigaj en la movado pasos same kiel la antaŭaj. Ni fidas pri tio; ni kredas pri la estonteco de nia ideo kaj entuziasme laboras por ĝi.

Ni restas ĉe la standardo. Ni firme tenas ĝin. Per nia kongreso ni pluportos ĝin antaŭen, renkonte al la plenumo de la Zamenhofa penso. Ni kongresos pravigante la vortojn de Zamenhof: La verdan standardon tre alte ni tenos!

Hugo Kraus.

La teravida kampulo

Tolstoj, la fama rusa verkisto, skribis en siaj "Vilagaj rakontoj" malgrandan, subtilan rakonton, kies tendencoj valoras ankaŭ por la nuna tempo.-

Ie en Ruslando vivis rica kampulo. Li havis imponan bienon kaj bonajn kampojn kaj herbejojn kaj vivante en bona prospero li estus povinta esti plene kontenta. Jen, iutage la diablo venigis en liajn manojn gazeton, en kiu estis skribite, ke tie sube ce la Baskiroj (tatara popolo inter Uralo kaj Volgo) ekzistas nigra, grasa kampotero, abunde acetebla per unu kampula capo plena je oraj rubloj. Kaj la kampulo decidas riski domon kaj bienon kaj posedajon ... oni do pagas al li orrublojn sur la tablon ... kaj formigras en la landon de la Baskiroj.

Ce la Baskiroj ekzistas stranga kutimo. Se iu venas al ili por aceti terenon, li devas meti sur la teron capon plenan je orrubloj. Tiam matene je la sunlevigo li rajtas ekiri kaj la tuta areo, kiun li cirkaŭiris gis la subeniro de la suno, apartenas al li. Sed se gis la momento de la sunmallevigo li ne revenas al la ekirpunkto de sia vojo, la tuta monsumo farigas posedajo de la Baskira tribo, de kiu li volis aceti terpecon kaj ec ne unu futo de la dezirita arec apartenas al li.

Nia kampulo do venas al iu Baskira tribestro por akordigi kun li. La tribestro klarigas al li la acetkondicon kaj la kampulo konsentas. La sekvintan matenon, unu horon antaŭ la sunlevigo, la kampulo, la tribestro, la plejaguloj de la tribo kaj kelkaj junuloj sur cevaloj kunvenas sur monteto, de sur kiu oni povas superrigardi la tutan aceteblan terenon. La kampulo metas sian capon sur la teron, planigas gin per ororubloj, kaj komencas sian migradon, akompanate de la rajdantaj junuloj. "Ne forgesu reveni ci tien gis sunsubeniro!" postkrias la Baskirestro al la kampulo kaj ridetas, vidigante sian blankan dentaron.

La kampulo vigle marsas antaŭen. Mirige sin etendas antaŭ liaj ridantaj okuloj la nigra plugtero, kiu perdigas en senlima malproksimeco. "Ho," pensas la marsanto "ci tie estos miaj ondantaj tritikokampoj!" kaj pro gojo li klakas per la fingroj. En certaj interspacoj la jun-

uloj enbatas stangojn en la teron. Nun venas herbeja valo. "Tiun mi nepre devas havi", mallaŭte diras al si la kampulo kaj li gojas pri la fisorica rivereto, traflu= anta la valon. Malgranda arbaro situas maldekstre - ankaŭ gin la kampulo krome kunprenos, kaj la rajdantoj signas gin per siaj limfostoj. La kampulo sufice varmigis dum sia marsado. Li rigardas cielen, la suno jam proksimigas al la zenito. "Nun mi devas turni min flanken jam" , li diras al si mem, sed jen, tie kusas antaŭ li ankoraŭ be= lega grenkampo, tiun li ne povas lasi. Li komencas kuri, car la vojo cirkaŭ la grenkampon estas tamen pli longa ol li imagis. Finfine la limfostoj estas batitaj ankaŭ cirkaŭ tiu ci terpeco, kaj nun la kampulo povas sin turni por reiri. La suno brile mallevigas laŭ longe de la ciela arko. ... "Ci devas rapidi", pensas la kampulo, car la monteto, sur kiu staras la Baskirestro kun sia sekvant= aro, - ili aspektas kvazaŭ formikoj - kusas ankoraŭ ter= ure malproksime. Kaj la viro rapidanta al la monteto apogas la brakojn sur la koksojn por povi kuregi kiel rapidkuranto. Li rigardas al la ciela kupolo, la sunglobo estas jam rugiganta kaj mallevas sin pli kaj pli. "Ho", gemplendas la kampulo, "ke mi do nur alvenu gustatempe!"

La Baskiroj sur la malproksima monteto svingas la brakojn, oni nur mallaŭte aŭdas ilin krii kaj voki, dum la junuloj trote rajdas post la preskaŭ senspire kureg= anta kampulo. Li sentas la koron bategi kontraŭ la ripojn kiel furioza martelo kaj estas al li kvazaŭ akraj trancilo j traborus liajn pulmojn. Tamen li kuras - kuregas. "Eble cio estos perdita", li diras al si, "la tero kaj la mono kaj la vivo".

La sangoruga sunglobo distancas ankoraŭ de l' hori= zonto je manlargeco. ... La kampulo vidas tiun sangan rugon kvazaŭ tra vualo pendanta antaŭ liaj okuloj. Li kuregas per lasta forto ... li sangeligas ... li faletas ... li falegas kaj perforte sin levas ... etendas la brakojn aeren ... jen li vidas la oron en la capo ekbri= li en la ruga sunlumo. "Ne", li pensas, "gi ne estu per= dita" ... nun li distancas de la monteto ankoraŭ dudek metrojn, ankoraŭ dek, ... ankoraŭ kvin ... la tribestro krias ... la suno subeniras ... la kampulo ekkaptas am= baŭmane la herbon ce la rando de la monteto, jen li fal= as teren kiel peza sako ... sangotorento saltas el lia

buŝo ... tremado trakuras lian fortan korpon ... jen, - li estas morta.

La estro de la Baŝkiroj ĵetas fosilon en la manojn de unu el la servistoj kaj diras: "Fosu ... du metrojn longe kaj unu metron large, ... tiom da tero suficas por unu homo!"

Trad. Carl Gasperini.

LA KVARA AUSTRIA ESPERANTO-KONGRESO EN VIENO 1950

P r o v i z o r a
K O N G R E S - P R O G R A M O

Sabate, 27. 5., atm.: Alveno de la kongresanoj, disdono de kongres-dokumentoj kaj logigo.
ptm.: Vizito de Internacia Esperanto-Muzeo aŭ de la Kastelo Schönbrunn.
vesp.: Interkoniga vespero (kun muziko).

Dimanĉe, 28. 5., mat.: Katolika Diservo kun E-prediko.
atm.: Solena malferma kunsido.
tm.: Komuna tagmango.
ptm.: Fakkunvenoj.
vesp.: Viena vespero (muziko, kantoj, popol=dancoj, skecoj, dancado).

Lunde, 29. 5., mat.: Kunsido de Aŭstria E-Instituto.
atm.: AEF-Ĝeneralkunveno (Malfermo, salutoj, elekto de la komisionoj, raportoj de la landestraroj).
tm.: Komuna tagmango.
ptm.: AEF-Ĝeneralkunveno (daŭrigo: raportoj de komisionoj, fakgrupoj; elektoj; fikso de kotizoj, agad-proponoj ktp).

Marde, 30. 5., mat.: Ekskursoj (Baden bei Wien kaj Klosterneuburg) ktp.

La definitivan programon ricevos ĉiu partoprenonto antaŭ la kongreso.

Karaj gesamideanoj! Faciligu la laboron de la LKK kaj anoncu tuj vian partoprenon, samtempe sendante vian kotizon!

Por la Loka Kongresa Komitato
O. Sinner, prezidanto.

E i n l a d u n g
zur 5. Jahreshauptversammlung des Oesterreichischen Esperantisten-Verbandes

welche für Montag, den 29. Mai 1950 nach Wien einberufen wird und im Rahmen des Oesterreichischen Esperanto-Kongresses stattfindet.

TAGESORDNUNG:

1. Eröffnung durch den Verbandspräsidenten, Minister a.D. Dr. Hans F r e n z e l.
2. Wahl eines Mandatsprüfungs-, eines Antragsprüfungs- und eines Wahlvorschlagskomitees.
3. Tätigkeitsberichte: a) Vorstand, b) Kassier, c) Redaktion, d) Esperanto-Institut, e) Landesleitungen und Delegierte, f) Fachgruppen, g) Mandatsprüfungskomite und h) Kontrolle.
4. Bericht des Wahlvorschlagskomitees.
5. Neuwahl des Verbandsvorstandes.
6. Bericht des Antragsprüfungskomitees. - Beschlussfassung über satzungsgemäss eingebrachte Anträge.
7. Festsetzung des Jahres-Mitgliedsbeitrages.
8. Referat über die nächste Tätigkeit des Verbandes.
9. Allfälliges. - Schlusswort.

Laut § 16, Punkt 11, der Statuten müssen alle Anträge zur Hauptversammlung schriftlich begründet spätestens 6 Wochen, solche auf Abänderung der Statuten 8 Wochen vor Abhaltung derselben beim Verbandsvorstand eingebracht werden.

Raimund C e c h
Geschäftsführender Obmann

Dr. Hans F r e n z e l
Präsident des Verbandes.

Maria Z a j i c e k
Schriftführerin

Auszug aus den Satzungen des Oesterreichischen Esperantisten-Verbandes

§ 15, Verbandsdelegierte.

1. Vereinigungen üben ihr Stimmrecht bei den Hauptversammlungen und ausserordentlichen Hauptversammlungen nur durch Delegierte aus. Sie haben zu diesem Zwecke auf je angefangene 30 Mitglieder für die laut letztem Vierteljahresausweis der Beitrag ordnungsgemäss an den Verband abgeführt wurde, einen Delegierten zu wählen.

2. Da jede Vereinigung bei der Verbands-Hauptversammlung vertreten sein soll, haben diese, im Falle der Unmöglichkeit, einen Delegierten selbst zu entsenden, die Pflicht, dafür Sorge zu tragen, dass ein von einer anderen Vereinigung entsandter Vertreter die Stellvertretung übernimmt. Es ist auch möglich, die Verbandsleitung zu ersuchen, für die Vertretung das Nötige zu veranlassen.

3. Den Delegierten (auch deren Stellvertretern) ist von ihrer Vereinigung eine ordnungsgemäss ausgestellte Legitimation über ihr Mandat und die Anzahl der vertretenen Mitglieder einzuhändigen.

4. Die Delegierten stimmen mit der von ihnen vertretenen Mitgliederzahl bei allen Abstimmungen ab.

5. Die Delegierten sind mindestens 4 Wochen vor Beginn der Hauptversammlung der Verbandsleitung bekanntzugeben.

§ 18. Die ordentliche Hauptversammlung.

4. Die Teilnahme ist jedermann, auch Nichtmitgliedern gestattet.

5. Als stimmberechtigt erscheinen jedoch nur:

a) der Verbandsvorstand mit allen seinen Mitgliedern,

b) alle Landesleitungen,

c) der Kontrollausschuss,

d) die Delegierten mit der Zahl der von ihnen vertretenen Mitglieder,

e) Einzelmitglieder, sofern sie nicht bereits durch einen Delegierten vertreten sind.

6. Alle nicht unter Punkt 5 genannten Teilnehmer haben nur beratende Stimme.

* * *

KONGRESDELEGITOJ: La land- kaj grupestraroj de AEF estas petataj elekti senprokraste siajn delegitojn por la kongreso kaj sciigi ties adresojn tuj al la Esperanto-Centro. Krome ili bonvolu koncepti la raportojn koncize por la maksimuma legdaŭro de 10-15 minutoj, por ke estu garantiita la necesa tempo por la priparoloj de la laboro farota.

KOMUNIKOJ DE LA ESPERANTO-CENTRO

Propono de la AEF-estraro al la ĝenerala-kunveno pri La membrokotizo al la Centro. Konforme al siatempa decido, laŭ kiu la membrokotizo al la Centro de AEF havu la altecon de la prezo de laŭtempa leterafranko al eksterlando, la Federacia estraro devus proponi al la ĝenerala-kunveno la plialtigon de gi je 70g al S 1.70. En sia konferenco de 1' 15.2.50 la AEF-estraro tamen, konsiderante la generalan financan situacion, nur proponis altigon de la kotizo por la Centro al S 1.20 anstataŭ S 1.-- (la landa kaj grupa kotizoj estu decidotaj de la landaj kaj grupaj estraroj laŭ iliaj bezonoj). Kotizo por izolaj membroj S 2.40. Por familianoj la duono.

Al la estraroj landaj, fakgrupaj kaj klubaj! Bonvolu regule sendi viajn raportojn! Instigu la membraron al la kolektiva aligo al UEA. La membro pagas jare S 1.--, kaj ricevas la membrokarton kaj servokuponaron. Ankoraŭ ne anoncis sin sufice da ges-anoj por ebligi la kolektivan aligon de nia Federacio al UEA. Bv.do urĝigi la aferon. - Okaze de la memortago pri la morto de Zamenhof je la 17a de aprilo estas dezirinde, arangi en kadro de la solenoj propagandon por la Esperanta literaturo.

S-ano direktoro Rudolf K a f t a n 80jara! Nia kara kaj altestimata s-ano kaj nestoro de la Viena E-movado, la direktoro de la fama horlogmuzeo en Vieno, Kaftan, la 30.4.50 80-jarigos. La AEF-estraro kore gratulas al li je la nomo de la aŭstria Esperantistaro kaj deziras al li fortan sanon kaj ankoraŭ longan prosperan agadon por la afero de Esperanto!

*

N I A M O V A D O E N A Ŭ S T R I O

MALSUPRA AUSTRIO: La landestraro raportas, ke ĝi ricevis de Arbeiterkammer für Niederösterreich subvencion je sil. 1000.-. Samtempe ĝi konigas, ke ĝi kompensos al ĉiu s-ano de Malsupra Aŭstrio, kiu faros la ŝtatan E-ekzamenon en tiu ĉi jaro, la ekzamen-kotizon kaj al ciu, kiu faros la ekzamenon pri instrukapablo ankaŭ la veturelspezojn. Interesitoj turnu sin al s-ano Johann SCHWARZ, Felixdorf, Bräunlichstr. 12. - Societo "VERDA LUMO", Hohenberg, estrata nun de s-ano Franz LAMPL, Furthof 55, konsistas nun el 7 anoj, kiuj kunvenas ĉiun duan lundon en ties logejo.

SUPRA AUSTRIO: La societo "ESTONTO", Linz, instalis spar-fondu-son por eksterlandaj vojagoj. Estante bazita sur internacia reciprokeco, la entrepreno ne estigas valutajn malfacilojn. Aŭstrianoj estas logigotaj kaj mange prizorgataj en eksterlando, por kio aliflanke en Aŭstrio same estas vartotaj egala nombro da eksterlandaj ges-anoj. La gastiganto ricevas po gasto kaj tago (sen tagmango) kompenson de ŝil. 10.-. Por tiu ĉi somero estas projektitaj 3 vojagoj: 1) al Suda Francio kun 3taga restado ĉe la SAT-kongreso en Torino (2993 km, 11 tagoj); 2) al Nederlando (2277 km, 8 tagoj) kaj 3) al Danio (pli ol 2ooo km, 10 tagoj). Ĉiu vojago kostas 570-590 ŝil. La momo devas esti en Linz lastdate la 3-an de junio. Anoncojn kaj informpetojn nur en E. direktu al la E-landestro de Supra Aŭstrio, s-ano Karl NIGL, Linz/Donau, Prinz Eugenstr. 11. Nur Esperantistoj ĝuu la avantagojn de la internacia reciproka valutkalkulado! La prezoj entenas: la kompletajn veturkostojn, modestajn maten- kaj vespermangojn, noktrestadon kaj potagan posmonon je 5 ŝil. en la eksterlanda valuto. Anoncu vin baldaŭ!

STIRIO: S-ano d-ro Adolf HALBEDL, Knittelfeld, Schmidgasse 15, akceptis la aŭstrian reprezentantecon de la Internacia Skolta Ligo. - Cirkulero 1 / 50 de la landestraro sciigas novajn kursojn en Aflenz, Graz, Thörl kaj Gross-Veitsch. Pro la E-kurso de radio Graz, okazonta ciuvendrede je la 15.30a, skribu aprobe al "Sender Graz,

Zuserthalg. 14! Krome ni ekscias pri iniciata paŝo pri helpi al sindonaj Esperantistoj, kiuj estas malfavorataj per senlaboreco. La estiminda edzino de s-ano d-ro HALB= EDL, proponinta tiun agadon, alvokas la ges-anojn, por ke ili laŭeble garantiu monatan kontribuon je ŝil. 5.--, monate. La ges-anoj, kiuj povas fari tion, sendu sian kontribuon al Landesleitung Steiermark des OeEV, Graz, Sackstr. 16/1.- La enkonduka parolado de la landestro de AEF al la Graz-a radiokurso estas aĉetebla je 30g kaj afrano ĉe la landestraro.

Gratulon kaj dankon al prof. Hainschegg! La Federacia Ministerio por Instruado per dekreto de 1' 8.12.49, Zl.72.496/III-8/49 lektorigis nian estimatan s-anon prof. HAINSCHEGG por la instruado de Esperanto ĉe la filozofia fakultato de la universitato Graz.

SALZBURG: Kun plezuro ni povas informi, ke nia aktiva E-instruistino, s-anino fakinstruistino Flora SELIGO, kun distingo pasigis la ekzamenon pri la instrukapableco de E.. Ni kore gratulas ŝin! (La s-anino jam instruas E-on en la kadro de la instruplano por ĉeflernejoj). LA ZAMENHOFA FESTO en Salzburg okazis la 10.12.49. Post vigliga marŝo de la muzikistaro s-ano societestro FOTINGER malfermis la kunvenon. La salono estis plenigitagis la lasta sidloko. Inter la ĉeestintoj s-ano F. povis saluti hon. prez. d-ron CHRISTANELL, hon. membron prof. SCHEIRL, prez. de katol. grupo "Estonteco" katedralan vikarion Kaps. La festparoladon faris s-ano dipl. kom. STEG=MULLER. Li skizis la vivon de nia majstro kaj la signifon de lia verko por la homaro. Speciale li lumigis la "homon" en Zamenhof. Zamenhof estu nia modelo! S-anino BAUMGARTINGER kaj d-ro ALTRICHTER deklamis poemojn de Zamenhof. Post la edifa parto, finita per la Himno, oni prezentis amuzan parton: Hinda fakiro (s. NOGGLER) sugestie influis "serpenton", kiu post mistikaj agadoj kaj fluta ludo je granda miro de la rigardantoj levis sin el la korbeto. Ridsalvo eksonis, kiam la "dangera serpento" estis ekkonebla kiel ĉeno da kolbasoj! Humorplenaj prezentadoj alternis. Senlumiginte la salonon, oni montris misterajn figurojn, fantomintajn laŭ timigaj rakontoj en la Salzburga regiono. Inter ili "Habergeis" (timigan kap=

rinegon) kaj Perchten, la teruraspektajn maskojn. Tiu programero estis dankinde arangita de dancgrupo"Jung Alpenland"(gvido E. VOGEL). Tiu junulargrupo partoprenis la programon ankaŭ per humoraj recitoj kaj groteska aktorado. Plialtigis la gajecon per deklamoj s-anoj KRANZINGER kaj FOTINGER, kiu fine prezentis gajan poemon de s-ano FRANZ el Wels. Ciuj gojis pri la sukcesinta festo.

TIROLO: S-ano Walter LAGGER, Innsbruck 1, Schliessfach 51, reprezentas en Aŭstrio la Internacian Polican E-Asocion.- En Innsbruck, Hofburg, okazas (miru kaj goju!) E-kurso, kiun partoprenas 30 profesiaj geinstruistoj. La kurson gvidas s-ano Hans STEINER, gi estas dankinda al s-ano Rolf HAUSER (Innsbruckm Peter Mayerstrasse 6/III. Gratulleteroj certe tre gojigus lin kaj certigus al li, ke lia laboro estas agnoskata inter la Esperantistaro! - E. nun estas instruata en Tirolo en 11 lernejoj. - En la monata gazeto de "Aŭstria Junulara Ruga Kruco, laborfolioj por edukistoj" aperis tutpaga artikolo de s-ano FOTINGER, Salzburg pri la temo "Per E. al la interpopola kompreno". - Kiom da infanoj vizitas la E-kursojn en la tirolaj lernejoj? Jen kelkaj nombroj: Kirchbichl 12 (instr. ERLACHER); Ellmau 17 (instr. lernejestro SALZMANN); Brixen i.T. 18(lernejestro MUHLBACHER); Wörgl 32 (fakinstr. PRAZELLER); Kufstein 40 (lernejestro STOCKL); Jenbach 52 (STEINER). La nombro en la ceteraj lernejoj momente ne estas konata. El leteroj al la kursgvidantoj estas konkludeble, ke la gepatroj montras kreskantan intereson pri E. - S-ano HILKERSBERGER Alois, Landeck, Domo Espero, transprenis la cefperantecon de TJO (Tutmonda Junular-Organizo). Li okazigis varbkunvenon por la mondcivitana movado "Garry Davis". 20 membroj de tiu movado nun komencis lerni E-on. La FERIA HEJMO"FRATARO" por sia biblioteko ricevis donace de la E-kluboj Kaloscay-Laboro, Vieno, 16 libretojn kaj brosurojn. Aliaj kluboj imitu ilian agadon, sendu al la FRATARO duoblajojn el via biblioteko! - Iam fanatika kontraŭesperanta redakcio de "Sonntagspost", Kufstein, akceptis longan artikolon "Baustein für den Frieden", verkitan de s-ano VISNEIDER. -ZAMENHOFFESTOJ okazis en Kufstein, Landeck, kaj Innsbruck. - La Landa Trafikoficejo por Tirolo dis-

ponigis denove 3000 ekz. de belega faldprospekto en E. Sendinte la sendafrankon, vi povas ricevi la prospekton senkoste de s-ano Hans STEINER, Kirchbichl. - Ŝtataj E.-ekzamenoj okazos printempe en Innsbruck. Interesitoj bv. sin tuj anonci. - La 4an de febr. la gastejo "Goldener Hirsch" en Innsbruck kunigis s-anaron en intima societo por Esperanto-baleto. En bonhumora, muzikema kaj dancema rondo por la programo sindediĉe eminentis ges-anoj Führer, Manzl, Schmid, Dalpiaz, Scheiflinger kaj la muzikistoj. La aranĝo rezultigis, ke anoncis sin pluraj gastoj kiel subtenantaj membroj!

I n t e r n a c i a j F e r i - S e m a j n o j
en K U F S T E I N / Tirolo, 19.-30.7.50!

Gvido: E-landestro de Salzburg, Franz Fötinger.

Anonco: kiel eble plej baldaŭ al "Verkehrsbüro (turisma oficejo)Kufstein,Tirolo,Aŭstrio"
Programo: ricevota de ĉiu partoprenonto. El la ekskursoj: aŭtobusveturoj al Großglockner, Ehrwald (ŝvebfervoje al Zugspitze); al Innsbruck (ŝvebfervoje al Hafelekar); rondveturo Thiersee, Schliersee, Tegernsee, Achensee; Kaiser-montaro, Ziller-valo. Trajne al Hopfgarten kaj per segolifto sur Hohe Salve (1.900m). Montamantojn kondukos spertaj montgrimpuloj sur la pintojn de Kaiser-montaro. Nagemuloj estos kondukataj al la 7 lagoj ĉirkaŭ Kufstein. Amuzo kaj distro ne mankos. Ankaŭ S o m e r a U n i v e r s i t a t o estos okazigata.

KARAJ GESAMIDEANOJ EN LA TUTA MONDO!
A n o n c u v i n m u l t n o m b r e !

La I.F.S. en KUFSTEIN propagandu grandstile Esperanton kaj iĝu neforgesebla travivajo de ĉiu en- kaj eksterlandano!

(La E-redakcioj estas petataj bonvole retiun ĉi informon!)

EL LA ESPERANTISTA VIVO EN VIENO

Prof.d-ro GÖRLICH raportas, ke en la oficiala lego=libro por teknikaj kaj metiaj instruejoj "Anteil und Verpflichtung" (Oesterr.Bundesverlag), kies kuneldonanto li estas, publikigis ekstrakto el la parolado de Z. dum la unua Bulonja kongreso. En dua volumo aperos ankaŭ artikolo pri la vivo de nia Majstro. - La stataj eksamenoj E. en Vieno, Salzburg kaj Innsbruck okazos supozeble en majo, antaŭ la aŭstria E-kongreso. - Harmonian kaj edifan travivajon ni havis, ĉeestante la lokan postmilitan kunvenon de la E-societo "DANUBIO" (8.1.50). La klubanoj speciale honoris s-anon CECH, sian multjaran,multmeritan sociestron. Salutis kaj alparoladis la festantojn diversaj eminentuloj de la Viena movado. El iliaj vortoj reliefigis la tradicia fideleco kaj nelamigema aktiveco por nia afero, kiuj karakterizas la membrojn. Ili en vere Zamenhofa persisto modeligis kiel fidelaj disciploj de Z. - En la kadro de ekspozicio de l' popolkleriga instituto Margareten la E-fakgrupo "VERDA STELO", estrata de s-ano BRAUN, arangis priesperantan ekspozicion. Inter la multaj homoj, kiuj vizitis ĝin, estis multaj eminentuloj de la urbo Vieno. Urbestro d-ro Körner povis konvinki sin pri la prospero de la E-movado. - S-ano dir. KAFTAN arangis apartan gvidadon tra sia horlogmuzeo por la Viena E-istaro, kiu estis multnombre partoprenata. - KULTURA KOMITATO de la lab-aj E-istoj faris en la grupo "HARMONIO" memorkunvenon okaze de la datreveno de la 12a de februaro 1934. En la impresa programo oni memoris pri la batalpretaj defendintoj de la demokratio kaj emfazis la neceson gardi ĝin kontraŭ ĝiaj malamikoj, sub kia ajn masko ili sin prezentos. - AUSTRIA E-INSTITUTO kompilis varian literaturan programon, kiu la 19.1.50 unuigis en la E-Centro ges-anojn el ĉiuj Vienaj grupoj. - En popolkleriga instituto Währingg s-ano Franz HAIDERER, projekciante multajn bildojn sur la ekranon, montris en du vesperoj la novan vivon en la ĉedanubaj landoj (arango de Kultura Komitato). - En E-kluboj KALOCSAY-LABORO (fakgrupo de popolkler.inst.W.) okazis serio da lumbildparoladoj, inter ili pri "vojagoj en Aŭstrio (s- anino KINDL), kaj letervespero (alskriboj projekciataj). - Gajan rende=

vuon donis al si la Vienaj geesperantistoj dum la balo de la Naturamikoj la 4an de marto 1950.

KATOLIKA ESPERANTISTA VIVO

AKLE, Vieno, let.adr. W.Mudrak, 3., Beatrixg. 19/9, kunvenas 1., Graben 13/I/II/25, la 2an kaj 4an mardon de la monato, je la 17-19a. Kurso elementa marde 19-20, samloke. Dua kurso merkrede 19'30 en 16., Hl.Geist-paroĥo.

ESPERO KATOLIKA, nia int.organo, reaperas en Vleuten, Utrecht. Abono por Aŭstrio supozeble S 25.-- pojare. XXIIa INTERNACIA E-KONGRESO okazos de la 10a-17a de aŭg. en Romo. Adr.:P.Prof.M.Carolfi A.F.M., 124 Via Merulana, Roma. Detaloj tiuj, resp. ĉe AKLE/Vieno. (Honoraj komitatanoj: Kardinalo ĉefepisk.d-ro Innitzer kaj princa ĉefepiskopo d-ro Rohracher. Okaze de la transdono de la honoraj kartoj la altaj ekleziuloj denove esprimis siajn intereson kaj fervoron por la afero de E.) AKLE/Vieno aranĝis "Kristnasko-festeton" kaj specialan kunvenon sub devizo "Estu enkore gaja" kun prelegoj, kantoj, sceno, parolĥoro, muzikaĵo ktp. - KATOLIKA E-LIGO DE JAPANIO fondiĝis okaze de la 400-jara datreveno de la tago, kiam Sta.Francisko Xaverius kiel unua kristana misiisto venis sur japanan teritorion. La ligo eldonos gazeton.

FERVOJISTA FAKGRUPO

Komunikoj de la komitato de la 2a I.F.E.F.-Kongreso en Salzburg-Aŭstrio je la 17a-21a de majo 1950

Favora kurzo ebligis redukton de la kongresa kotizo! Ĝi anstataŭ 3 dolaroj nun estas 1.60 dol., egalvalore al 40 aŭstr.ŝil. Familianoj pagas la duonon. Estas rekomendinde havigi al si vojaĝĉekojn en aŭstr.ŝil. En la monsangejo, instalota en la kongresejo, eblos ŝangi ĉekojn de ciuj landoj kaj valutojn de jenaj landoj: Svisio, Nederlando, Belgio, Germanio, Anglio, Danio, Norvegio kaj Svedio. Ĉekoj en aŭstr. ŝil. kaj valutoj de la cititaj landoj, kompreneble ankaŭ dolaroj, estos ŝangataj je favora kurzo. Oni pagu la kongreskotizon post alveno en Salzburg, aŭ per nomitaj valutoj, aŭ per aŭstr. ŝil.. La

kotizo rajtigas partopreni ĉiujn vesperajn aranĝojn kaj belegan, gajan ekskurson al fama, bela loko. Provizora programo sekvos. - Ĉiuj kongresanoj estos al vi enmanigataj tuj post via alveno. Kongresanoj, prizorgu jam nun viajn vojaĝbiletojn! Indiku kiel vojaĝcelon "Salzburg". Tiu, kiu intencas daŭrigi la vojaĝon post la kongreso, kompreneble prenu bileton al la koncerata loko. Laŭbezone konsultu la Org. Kongreskomitaton, Salzburg I, Postfach 65 - Aŭstrio. - Ni disponas pri kelkaj malmultekostaj amaslogejoj, pro tio ni havas sufiĉe da ĉambroj en hoteloj kaj gastejoj je moderita prezo (10 - 20 sil.)

VENU MULTNOMBRE! Kunportu laŭeble vialandan kostumon. La kongreso estos unika travivaĵo por ĉiu!

B O N V E N O N E N S A L Z B U R G !

La Org. Kongresa Komitato.

(La E-gazetaro estas petata bv. represi la informon)

I N T E R N A C I A E S P E R A N T O - M O V A D O

Zigzage kaj telegrame tra la mondo

Ĉu miraklo en Hamburgo? Tiel titolis HEROLDO DE ESPERANTO informon, ke preskaŭ mil infanoj anoncis sin por E-kursoj. Nederlanda direktoro de ŝtata lernejo, interkonsentinte kun la instruistaro kaj la gepatroj de la gelernantoj, decidis enkonduki E. kiel lernendan fakon en la unua klaso. La ned. instruministro jam deklaris, ke li aprobos la enkondukon de E. tuj kiam la bezonataj instruistoj estos disponeblaj. - Ĉeĥoslovaka posto eldonis 4 ilustritajn postkartojn kun teksto en ĉeĥa kaj E-a lingvoj. - E. malpermesita en Portugalio. Laŭ Svenska E-Tidningen la portugala ŝtatpolico likvidis la tiean movadon, malpermesante instruadon kaj propagandon de nia lingvo, konfiskante la tutan havaĵon de la Portugala E-Ligo. Ĉiuj letteroj surhavante indikaĵojn pri E. estos konfiskataj. - Germana posto rekomendas E. al la postistoj. - La Universala Deklaracio de Homrajtoj estis tradukata en E. kaj dissendata de UNO. - La kotizmarkoj de la Internacia Turista Asocio "La Naturamikoj" ekde nun estas surpresataj en E. - KULTURA REVUO de komisiittejo por informoj kaj klerigo, eksterlanda sekcio, Bratislava, estas ricevebla senpage. Skribu al: Poverenictvo informacii a osvety

Bratislava. - SOS por hungara Radio! Skribu al Radio Kossuth, Brody Sandor u.7, Budapest VIII, por ke la sendoj estu refunkciigataj! - LITERATURA MONDO informas, ke pro financaj kaŭzoj la revuo ne plu povas aperi. - DANA KARAVANO intencos veni somere Aŭstrion. - La Sankta Jaro reklamita en E. Dezirante la programon kaj la gvidlibron de la pilgrimanto, skribu al: Ĝenerala Komitato de la Sankta Jaro, Roma, Italio. - "En la ombro de la Turo Eiffel" okazos ĉijare la UEA-Kongreso en Parizo. Ĝi alportos por la kongresanoj diversajn organiz-teknikajn novaĵojn. Por la laborkunsidoj funkcios 4 komisionoj: 1) E. kaj lernejoj, 2) scienco kaj filozofio, 3) internacia kunlaborado kaj 4) E. kaj internacia trafiko. La decidoj de la komisionoj estos submetataj al la ĝenerala kunsido de la kongreso. Denove estos Internacia Somera Universitato. Okazos poezia kaj oratora konkursoj, la lasta pri la temo "E. kaj la monda paco". Ankaŭ por Infanesp-istoj estos aparta arango. La kongreso havos lokon de la 6a - 13a de aŭg. Detalojn eksciu en la E-Centro. -UEA atingis 1949 preskaŭ 19.000 membrojn. - JUNULARA SEKCIO DE Germana E-Asocio komunikas pri sia tendaro, starigota por la semajno inter la 30.5.-4.6.50 en Obergreifenberg/Taunus. Skribu al: Elli Rabl, Frankfurt a/M-Praunheim, Pfützerstr.102. - La germana E-kongr. estos inter 27.5.-2.6. en Mainz. Adr.: E-grupo, 22b Mainz, Boppstr. 9.

* * *

Eigentümer und Herausgeber: Österr. Esperantistenverband. Verlag: "Tramondo". - Verantwortlicher Redakteur: Hugo Kraus, sämtliche: Wien I., Neutorgasse 9 (Tel.: U 23180)
Druck: Hans Likan, Wien VI., Mollardgasse 85a.